# Leciono 12

(Enkonduko por la ekzercoj pretigitaj por la kompleto ***Pasporto al la tuta mondo***)

### *Resumo de la rakonto:*

Helena ricevas la leteron de Ruselo kaj estas kontenta, ĝis ŝi eltrovas ke la poemo ne estas de Ruselo, sed de Karlo. Nun kaj ŝi kaj Karlo estas korŝiritaj. La difektita detektivo provas interrompi la maratonon sen sukceso. Je la lasta minuto, Karlo aliĝas kaj trovas ke li ja estas kaj poeto kaj atleto: "sana menso" en "sana korpo". Li planas partopreni pli da maratonoj kun Nina.
Jolanda akcidente trovas la notlibron de la detektivo kaj senmaskigas lin kiel volapukiston. Tiom da klientoj vizitas kafejon Zamenhof dum la maratono ke la familio baldaŭ havos sufiĉe da mono por iri al la UK. La detektivo revenas por peti pardonon kaj oferti helpon en la kafejo – eĉ kanti. Sed ĉu ili sukcesos, kaj kio okazos al Helena, Ruselo, Jolanda, kaj la kafejo?

### *Resumo de la rakonto laŭscene:*

**Sceno 1:** Nina akceptas aliĝojn por la maratono en la parko.

**Sceno 2:** Helena ricevis am-poemon de Ruselo kaj ŝi raviĝas.

**Sceno 3:** La detektivo venas al la parko. Nina provas kurigi lin en la maratono.

**Sceno 4:** Georgo serĉas la notlibron. Helena venas kaj laŭtlegas al li la poemon de Ruselo, sed Karlo envenas.

**Sceno 5:** Nun la detektivo malsanas; lia stomako doloregas. Li komprenas ke venenita estis la kuko kiun Georgo proponis al li.

**Sceno 6:** Karlo indigne diras, ke la poemo kiun Helena legis estas verkita de li. Ruselo ne verkis sed nur trovis ĝin. Karlo kredas, ke li iĝos eminenta poeto, sed la patro klarigas, ke tio bezonas multan ekzercadon kaj ekvilibran vivon.

**Sceno 7:** Helena denove estas mizera. Ŝi intencas detrui sian skulptaĵon ĉar ĝi memorigas ŝin pri Ruselo. Jolanda haltigas ŝin. Ŝi trovis la notlibron de la detektivo kaj enrigardas… .

**Sceno 8:** Karlo sekvas la konsilon de la patro kaj registriĝas por la maratono. Li renkontiĝas kun Nina; ili havas komunan malamon de ŝafoj.

**Sceno 9:** La detektivo estas eĉ pli kolera, pro la venenita kuko kaj stomakdoloro. Nun li vere fermos la kafejon kaj ĵetos Georgon en prizonon.

**Scenoj 10 kaj 12:** Karlo kuradas en la maratono, laŭ la mantro "sana menso en sana korpo".

**Scenoj 11 kaj 13:** La enprizonigaj planoj de la detektivo paneas, ĉar Jolanda eniras kun la notlibro de la detektivo. Jolanda akuzas lin - li estas volapukisto! Ĉio en la notlibro estas skribita en Volapuko. Nun ili komprenas kial li volis aresti ĉiujn esperantistojn. La detektivo pentas kaj konfesas, ke li nun ekamis Esperanton.

**Sceno 14:** La kafejo estas tre okupata, pro la maratono. Ili vidas Karlon preterpasi.

**Sceno 15**: Helena mizeras denove.

**Sceno 16:** Nina gajnas la maratonon. Karlo estas dua. Ili iras festi en kafejo Zamenhof.


**Sceno 17:** Georgo kiel kelnero nur konfuziĝas. Karlo kaj Nina envenas. Ili enamiĝis kaj foriros kuri maratone tra la mondo. La pentanta detektivo revenas kun botelo da vino kaj kanto por la gastoj.

### *Gramatikaj temoj:*

La sufikso ***-ig-*** por indiki la faranton, kaŭzanton aŭ kaŭzon de ago. La kontrasto inter ***-ig-*** (kaŭzo) kaj ***-iĝ-*** (rezulto).

### *Esperantaj temoj:*

Poetoj Zamenhof, Miĥalsky, Boulton, Auld, romanisto Varankin; Universalaj Kongresoj, Volapuko, volapukisto kaj "fina venko."



## Ni saĝigos vin!

Jes, vi ekestos saĝa, ĉar ni instruos al vi pri la nova sufikso ***-ig-***. Ĝi montras la faranton de ago (Ruselo suferigas Helenan), la kaŭzon (La foriro de Ruselo suferigas ŝin) aŭ la kaŭzanton, kiam tiu ne estas mem la faranto (La detektivo enprizonigos Georgon: li supozeble ne mem persone ŝlosos la pordon, sed li kaŭzos la enprizonigon). Jen pliaj ekzemploj:

| Celo: Montri kaŭzon | Uzotaj radikoj | Ekaj radikoj | La konstruata verbo | La signifo: kaŭzis, kaŭzas, kaŭzos… | La responda -iĝ- verbo |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | adjek-tivoj | trankvil- | La homamaso en la parko maltrankviligis la detektivon. | ke li estu maltrankvila. | Li maltrankviliĝis. |
| de | | fam- | La poemoj famigos Karlon. | ke li estu fama. | Li famiĝos. |
| kvalit- | | mizer- | Ruselo mizergis Helenan. | ke ŝi estu mizera. | Ŝi mizeriĝis. |
| ŝanĝo | | gaj- | La detektivo gajigis la etoson. | ke ĝi ekestu gaja. | La etoso gajiĝis. |
| | | surd- | Ne kriu! Vi surdigos min. | ke mi ekestu surda. | Mi surdiĝos. |
| 2 | sub- | vort- | Poeto vortigas ideojn. | ke ideoj aperu per vortoj. | Ideoj vortiĝas. |
| de stat- | stantivoj | kelner- | Filisa kelnerigis Georgon. | ke li ekestu kelnero. | Li kelnerĝis. |
| ŝanĝo | | | La sorto amikigis ilin. | ke ili ekestu amikoj. | Ili amikiĝis. |
| 3 | | -ebl- | Komputilo ebligas ret-mesaĝojn. | ke ili estu eblaj. | Ili ebliĝas. |
| | sufiksoj | -ar- | La maratono arigas atletojn. | ke ili estu en aroj. | Ili ariĝas. |
| de | | -aĉ- | La kuko aĉigis ĉies vivon. | ke ili estu aĉaj. | Vivoj aĉiĝis. |
| diversaj | prefikso | eks- | Oni eksigas fuŝan kasiston. | ke fuŝa kasisto estu eksa. | Li eksiĝas.* |
| agoj | prepozi- | trans | Telefono transigas mesaĝojn. | ke ili ekestu transaj. | Ili transiĝas. |
| | cioj | apud | Elektro-paneo apudigis la paron. | ke ili ekestu apudaj. | Ili apudiĝis. |
| | aliaj | mult | Georgo multigas problemojn. | ke ili estu multaj. | Ili multiĝas. |
| | | for | Jolanda forigis la danĝeron. | ke ĝi estu for. | La danĝero foriĝis. |
| 4 | substan- | sur papero | Vi surpaperigas ideojn. | ke ili ekestu sur papero. | Ili surpaperiĝas. |
| | tivo plus | en prizono | La detektivo enprizonigos lin. | ke ili ekestu en prizono. | Li enprizoniĝos. |
| de lok- | prepo- | kun barbo | La detektivo kunbarbigis sin. | ke li ekestu kun barbo. | Li kunbarbiĝos. |
| ŝanĝo | zicio | el poŝo | Ruselo elpoŝigis notlibron. | ke ĝi ekestu el la poŝo. | Ĝi elpoŝiĝis. |

Rimarku, ke la objekto de la transitiva -ig- verbo fariĝas la subjekto de la koresponda netransitiva -iĝ- verbo. La subjekto de la -ig- verbo malaperas, ĉar ne plu gravas emfazi la faranton aŭ kaŭzanton aŭ kaŭzon de la ago.

* Tamen estas nuanco inter la du. Eksigi = maldungi, eksiĝi = demisii.

| Celo kaj uzotaj radikoj | Ekaj verbo-radikoj | Baza frazo | La konstruata frazo | La signifo: …kaŭzas ke… |
|---|---|---|---|---|
| 5 | pensi | Mi pensas. | Tio pensigas min. | mi pensu. |
| Montri la | veni | Homoj venas. | La maratono venigas ilin | ili venu. |
| faranton, | kuri | La detekitvo ne kuras. | Nina kurigos la detektivon. | li kuru. |
| kaŭzon aŭ | devi | Ruselo devas foriri | La ŝafoj devigis al Ruselo foriri | li devu foriri. |
| kaŭzanton | suferi | Helena suferas. | Ruselo suferigas ŝin | ŝi suferu. |
| de ago. | rajti | La detektivo rajtas. | La leĝo rajtigas lin. | li havu la rajton. |
| | vulkani | Vulkanas la ventro | La kuko vulkanigas la ventron. | ĝi vulkanu. |
| netransitiva | morti | Ĉu la detektivo mortos? | Ĉu la kuko mortigos lin? | li mortu. |
| verbo | okazi | Eble okazos pliaj maratonoj. | Eble Nina okazigos ilin. | ili okazu. |
| | malaperi | La notlibro malaperis | Ruselo malaperigis ĝin | ĝi malaperu. |
| | fali | La vazo falis. | Georgo faligis ĝin. | ĝi falu. |
| | panei | La aŭto de la doktoro paneis. | Georgo paneigis ĝin | ĝi paneu. |
| 6 | memori | Helena memoras la statuon. | La statuo memorigas ŝin pri li. | ŝi memoru. |
| Montri | manĝi | La detektivo manĝis kukon. | Georgo manĝigis ĝin al li. | li manĝu/ĝi manĝiĝu. |
| kaŭzon aŭ | trinki | Georgo trinkis vodkon. | Flora trinkigis ĝin al li. | li trinku/ĝi trinkiĝu. |
| kaŭzanton. | ripari | La riparisto riparis la aŭton. | Filisa kaj Georgo riparigis ĝin. | ĝi ripariĝu. |
| transitiva | rompi | Georgo rompis la vazon. | Lia nervozeco rompigis ĝin. | ĝi rompiĝu. |
| verbo | venki | Nina venkis la konkurantojn. | Ŝia bona trejnado venkigis ŝin. | ŝi venku. |

Rimarku, ke en vico 5, la baza verbo estas unu-liga, tiukaze la verbo kun -ig- ekestas duliga.
Rimarku, ke en vico 6, la baza verbo estas du-liga, tiukaze la verbo kun -ig- ekestas triliga! Ekzemple: ‘Detektivo manĝas kukon’. Du aĵoj necesas por la ago. ‘Georgo manĝigas la kukon al li’. Tri aĵoj necesas por la ago. Eĉ ‘Rompigi’ estas triliga en la frazo ‘Lia nervozeco rompigis ĝin’, ĉar necesas vazo, Georgo kaj lia nervozeco.

Nun, daŭrigu vian vojon al la ekzercoj!